

& Problemo terminologia:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Vladimír Gazda (Frenezetaĵoj, Bratislava 1992). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Bresta balado.>

(# Melodio:

<1,6:29> (

/doTi re3do doTi Ti; La3La LaaLaMi La; LaTi doTi TiTi Ti;Ti TiTi Tire do;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La a)

)×13)+

(& Strofoj:

'1 Trankvile kaj senmove ; en seĝo de frizisto ; mi sidas, dum li vigle ; laboras, kun persisto.

(×:; **Paŝu gajan la dancon ; Brilas aŭroro bele taga ; Venu en alta somertemp'!**)

'2 klopodas la maldensan ; hararon per kombilo ; kaj per tondilo formi; laŭ akceptebla stilo.

'3 Kaj tiel laborante ; li ĉirkaŭ mi saltetas. ; Fininte, manon sian ; sur kapon mian metas.

'4 li kaj ĝentile diras: ; "Pardonu, sed mi poensas, ; ke via moŝta skalpo ; jam iom tro maldensas.

'5 Ĉu darfas mi rimedon ; por haroj rekomendi?" ; Volante kontraŭ ĉiu ; elspezo min defendi,

'6 respondas mi: "Nu, tiel ; en nia mondo estas: ; sur saĝa kapo haroj ; malsaĝaj ja ne restas."

'7 "Vi pravas, estas vero," ; ekvoĉas vir' apuda ; razate; en spegulo ; rebrilas tute nuda

'8 kranio lia. Kaj li ; daŭrigas: "Estas stulte; pro l' haroj elfalantaj ; malgaji kaj eĉ multe

'9 elspezi por rimedoj ; por l' harojn rekreskigi ; aŭ la falantajn iel ; al la kranio ligi.

'10 Eĉ groŝon ne elspezu ; por ia 'super-varo'; post ĝi nur pli rapide ; foriros la hararo.

'11 Imitu l' saĝan skoton: ; anstataŭ harkreskilon ; aĉeti, kalviĝinte ; li vendis la kombilon!

'12 Do ankaŭ vi ne tristu ; pro estonteco via, ; ĉar la problemo estas ; nur terminologia:

'13 ne ploru post la perdo ; de l' kapa har-lanugo: ; kalvaĵo ne ekzistas, ; nur – frunto ĝis la pugo!"